Go 96.G.3³

# PRI LA ESENCO DE KONSTITUCIO

PAROLADO

TENITA DE

## FERDINAND LASSALLE

**en Berlina civitana societo**

**printempon 1862**

ESPERANTIGITA DE D. J.

1912

Eldonejo: W. NUTTERS, van Ostadestraat 94,
Amsterdam, Nederland.

Prezo: 1 ekzemplero 8 sd. (20 centimes, 16 Pfen.,
2 d., 20 Heller k. t. p.)

# PRI LA ESENCO DE KONSTITUCIO

Oni invitis min paroladi al tiu ĉi estimata kunveno, kaj mi elektis temon, kiu ja rekomendiĝas per si mem, ĉar ĝi estas antaŭ ĉiuj laŭtempa. Mi, nome, parolos pri la *esenco de konstitucio.*

Mi atentigas antaŭe, gesinjoroj, ke mia parolado estos *rigore scienca.* Sed, malgraŭ tio, aŭ pli ĝuste *rekte tial,* estas inter vi neniu, kiu ne povus, de komenco ĝis fino, sekvi kaj plene kompreni ĝin.

Ĉar la vera scienceco — estas bone, ĉiam memori ĉi tion, gesinjoroj — konsistas el nenio ol el tiu *klareco de pensado,* kiu, ne farante kian ajn antaŭsupozon, paŝo post paŝo deduktas ĉion el ĝi mem, kaj kiu rekte pro tio nerezisteble ekkaptas la intelekton de ĉiu nur iom atenta aŭdanto.

Tial ĉi tiu klareco de pensado postulas de l' aŭdantoj neniun specialan antaŭsupozon. Kontraŭe, ĉar ĝi konsistas, kiel mi diris jam, nur el tia senantaŭsupoza pensado, kiu deduktas ĉion el ĝi mem, tial ĝi eĉ ne *toleras* antaŭsupozojn. Ĝi toleras kaj postulas nur tion ĉi, ke la esplorantoj havu por la momento *nenian* antaŭsupozon, *nenian* antaŭjuĝon, sed ke ili, kiom ajn ofte ili jam pensis aŭ parolis pri la traktata objekto, ĝin esploru *denove,* tiel, kvazaŭ ili scius ankoraŭ nenion fiksitan pri ĝi, kaj do, almenaŭ por la tempo de l' esploro, sin demetu de ĉio, kion ili ĝis tiam kutimis supozi pri tiu objekto.

Mi do komencas mian paroladon per la demando: kio estas konstitucio? El kio konsistas la esenco de konstitucio?

Gesinjoroj, nuntempe ĉiu parolas de mateno ĝis nokto pri konstitucio. Pri konstitucio oni senĉese parolas en ĉiuj ĵurnaloj, en ĉiuj societoj, en ĉiuj kafejoj.

Tamen, se mi serioze demandus: kio estas la esenco, la ideo de konstitucio, tiam, mi timas, ke el tiuj parolantoj nur malmultaj povus doni kontentigan respondon.

Verŝajne multaj sin sentus tentataj, je tiu demando, ekpreni la volumon de l' prusa leĝaro de l' jaro 1850, kaj simple montri la konstitucion de Prusujo.

Sed vi tuj komprenas, ke tio ne estus respondo je mia demando. Ĉar tio, kio troviĝas en ĝi, estas nur *speciala enhavo* de iu konstitucio, nome la prusa, kaj tio neniel povas respondi la demandon: kio estas la esenco, la ideo de konstitucio ĝenerale?

Se mi farus tiun demandon al juristo, tiam li, eble, respondus jene: „Konstitucio estas inter reĝo kaj popolo ĵurita interkonsento, fiksanta la fundamentajn principojn de leĝdonado kaj de regado en iu lando." Aŭ eble, ĉar ekzistas ankaŭ respublikaj konstitucioj, li respondus ankoraŭ pli ĝenerale: „Konstitucio estas la en iu lando proklamita leĝo fundamenta, kiu fiksas la organizadon de la rajto publika de tiu nacio."

Sed ĉi ĉiuj kaj similaj juraj difinoj, same kiel la antaŭa respondo, ne povas formi veran respondon je mia demando. Ĉar ĉi ĉiuj respondoj ĉiam enhavas nur eksteran priskribon de tio, kiel konstitucio kreiĝas, kaj kion konstitucio faras; sed ne klarigon: kio *estas* konstitucio. Ili donas kriteriojn, signojn per kiuj oni *ekkonas* konstitucion ekstere kaj laŭ juro. Sed ili tute ne konigas nin la ideon, la esencon de konstitucio. Ili do lasas nin en plena malklareco pri tio, ĉu kaj kial iu konstitucio estas bona aŭ malbona, ebla aŭ neebla, daŭra aŭ nedaŭra. Ĉar ĉio ĉi nur povas montriĝi el la *ideo* de konstitucio. Unue oni devas koni la esencon de konstitucio ĝenerale, por scii, ĉu iu difinita konstitucio estas konforma al ĝi kaj

kiel estas kun ĝi. Sed tiu ekstera kaj jura maniero de difino, — kiu estus egale aplikebla al kiu ajn folio da papero, subskribita de nacio aŭ de nacio kaj de ĝia reĝo, kaj proklamita por konstitucio, tutegale, kia estas la enhavo de tiu folio da papero, — tia difino lasas nin tute en malklareco pri la esenco de konstitucio. Nur la esenco de la konstitucio — vi mem konvinkiĝos pri tio, kiam ni estos venintaj al tiu esenco — estas la fonto de ĉiu praktiko kaj teorio pri konstitucifarado; kaj tiu praktiko kaj teorio poste disvolviĝas el tiu esenco facile kaj kvazaŭ per si mem.

Mi do ripetas mian demandon: kio estas konstitucio, kio estas la esenco, la ideo de konstitucio?

Ĉar ni ankoraŭ ne scias tion — ni devas ankoraŭ per komuna esploro ĝin trovi, gesinjoroj — ni tial aplikos metodon, kiun apliki estas ĉiam konsilinde, kiam pri iu afero estas serĉata klara kompreno. Tiu metodo estas simpla, gesinjoroj. Ĝi konsistas en tio, ke oni komparas la aferon, kies esencon oni serĉas, kun alia, samspeca afero, kaj penas klare kaj akre trapensi la diferencon, kiu ilin, tamen, disigas.

Aplikante do nun tiun metodon, mi demandas: en kio diferencas inter si *konstitucio* kaj *leĝo?*

Ili ambaŭ, konstitucio kaj leĝo, evidente havas samspecan karakteron. Konstitucio celas havi povon de leĝo; ĝi do celas esti leĝo *ankaŭ*; sed, ĝi ne celas esti *nur* leĝo, sed *ankoraŭ pli* ol leĝo. Estas do ankaŭ diferenco. Ke ekzistas tia diferenco, ke konstitucio ne estas *nur* leĝo, sed ankoraŭ pli ol leĝo, estas ja cent faktoj por tion pruvi.

Tiel okazas, ke vi ne koleriĝas, gesinjoroj, se novaj leĝoj aperas. Kontraŭe, vi scias, ke estas necese, ke preskaŭ ĉiujare novaj leĝoj eliras. Kaj, tamen, *neniu* nova leĝo povas aperi, kiu ne ŝanĝas la ĝis tiam ekzistintan leĝan rilaton. Ĉar, se la nova leĝo kaŭzus nenian ŝanĝon en la

ĝis tiam ekzistinta leĝa situacio, tiam ĝi estus ja superflua kaj ĝi ne estus eldonata. Ŝanĝo de leĝo do *ne* kolerigas vin. Kontraŭe, vi konsideras tion, ĝenerale, kiel la regulan taskon de l' regaj institucioj. Sed, se oni ektuŝas la konstitucion, tiam vi koleriĝas, kaj vi krias: „Oni tuŝas nian konstitucion." Pro kio tiu diferenco? Tiu diferenco ja neneigeble ekzistas, — en multaj konstitucioj eĉ estas fiksita: la konstitucio ne povos esti ŝanĝata; en aliaj: ĝi povos esti ŝanĝata nur per $^2/_3$ el la voĉoj de la leĝodonantaj institucioj, anstataŭ per simpla plimulto; en ankoraŭ aliaj: la leĝodonantaj institucioj ne povos, ankaŭ ne kune kun la ceteraj regadopotencoj, plenumi iun de ili projektitan ŝanĝon de la konstitucio, sed por tio devas esti elektata, speciale por tio, nova reprezentantaro, por decidi pri tiu ŝanĝo.

Ĉi ĉiuj faktoj simple montras, ke konstitucio, laŭ la komuna sento de l' popoloj, estas io ankoraŭ pli sankta, pli fiksita, pli nealiigebla, ol estas ordinara leĝo.

Do, mi ripetas mian demandon: per kio diferencas konstitucio de ordinara leĝo?

Je tiu demando oni kutime ricevos jenan respondon: Konstitucio ne estas nur leĝo, kia estas ĉiu alia, ĝi estas la *fundamenta leĝo* de la lando. Kaj estas tre eble, gesinjoroj, ke en tiu respondo malklare sin kaŝas la ĝusta respondo. Sed en tiu malklara maniero la respondo estas ankoraŭ tiel same senutila. Ĉar sin prezentas, male, la demando: en kio diferencas *leĝo* de *konstitucio?* Ni do restis sur la sama punkto. Ni trovis nur novan nomon: leĝo fundamenta, kiu, tamen, nin servas al nenio, se al ni ne estas samtempe klare, kia diferenco ekzistas inter leĝo fundamenta kaj leĝo ordinara.

Ni tial penu proksimiĝi al la afero tiamaniere, ke ni esploras, kiajn ideojn entenas la nomo „fundamenta leĝo", alivorte: en kio leĝo fundamenta devus diferenci de leĝo ordinara, por efektive pravigi sian nomon.

Leĝo fundamenta do devus:

1e. esti tia leĝo, kiu kuŝas pli profunda ol ordinara leĝo; tion pruvas la aldono „fundamenta“;

2e. por esti leĝo fundamenta, ĝi devus vere formi la fundamenton de la aliaj leĝoj, do, la leĝo fundamenta devus reprodukti sin en la ordinaraj leĝoj, por tiel montri ke ĝi vere estas ilia fundamento. La leĝo fundamenta do devas efikadi en la aliaj, la ordinaraj leĝoj.

3e. Sed iu afero, kiu havas fundamenton, ne povas plu esti laŭvole tia aŭ alia; ĝi nepre devas esti tia, kia ĝi estas. Ke ĝi estus alia, tion ne tolerus ĝia fundamento. Nur io sen fundamento kaj tial hazarda, povas esti tia, kia ĝi estas, kaj ankaŭ alia, sed io havanta fundamenton, nepre devas esti tia, kia ĝi estas. La planedoj, ekz., havas movadon. Tiu movado havas ian fundamenton, kiu ĝin kaŭzas, aŭ ĝi ne havas tian fundamenton. Se ĝi ne havas ĝin, tiam tiu movado estas hazarda kaj ĝi povus esti ĉiumomente alia. Sed se ĝi havas fundamenton, nome, kiel asertas la naturesplorantoj, la altiroforto de l' suno, tiam el tio rezultas, ke tiu movado de l' planedoj estas kaŭzata kaj regulata de tiu fundamento — la altiroforto de l' suno — *tiamaniere*, ke *ĝi ne povas esti alia ol tia, kia ĝi estas.* La ideo de la fundamento do entenas la penson pri iu *aganta neceseco,* iu efikanta forto, kiu pro *neceseco* kaŭzas, ke ĝia objekto nepre nur povas esti tia, kia ĝi estas.

Se do la konstitucio estas la leĝo fundamenta de la lando, tiam ĝi estas — kaj nun krepuskas antaŭ ni la unua lumo, gesinjoroj — iu *aganta forto,* kiu kaŭzas, ke ĉiuj aliaj en tiu ĉi lando eldonataj leĝoj kaj juraj aranĝoj, *kun neceseco* estas tiaj, kiaj ili estas, tiel ke nepre nenia alia leĝo ol *tiuj ĉi* en tiu ĉi lando *povus* esti farata.

Nu, gesinjoroj, ĉu ekzistas en la lando — kaj je tiu demando ekbrilas plene la lumo — ĉu *estas* en la lando iu forto aganta, kiu efikas en ĉiuj leĝoj eldonataj en tiu ĉi lando, kaj efikas tiel, ke tiuj ĉi leĝoj *nepre devas esti tiaj, kiaj ili estas?*

Ho certe, gesinjoroj, tia io *ekzistas* kaj tiu io estas nenio alia ol — la *efektivaj potencoproporcioj*, kiuj en iu lando ekzistas.

La efektivaj proporcioj de potenco, kiu en ĉiu lando ekzistas, jen kio estas tiu forto aganta, kiu en ĉiuj leĝoj efikas tiamaniere, ke ili nepre ne povus esti aliaj ol tiaj, kiaj il estas.

Mi rapidas, komprenebligi min per palpebla ekzemplo. Tiu ekzemplo certe ne estus ebla en la formo de mi elektita. Sed — ne konsiderante tion, ke baldaŭ pruviĝos, ke la sama ekzemplo en alia formo estas tute ebla, — ja estas tute egale, ĉu la ekzemplo povus okazi; grava estas nur, ĉu ni povas lerni ion per ĝi, nome la naturo de l' aferoj, kiuj prezentus sin, *se* la ekzemplo okazus.

Vi scias, gesinjoroj, ke en Prusujo nur tio havas potencon de leĝo, kio estas publikigata en la leĝokolekto. La leĝkolekto estas presata en la kortega presejo de Decker. La originaloj mem de la leĝoj estas gardataj en certaj arĥivoj de l' ŝtato, la presitaj leĝoj en aliaj arĥivoj, en bibliotekoj kaj librejoj.

Nun imagu la kazon, ke okazus granda brulado, tiel ke ĉiuj tiuj ŝtatarĥivoj, bibliotekoj kaj librovendejoj kaj ankaŭ la kortega ĉefpresejo de Decker tute forbrulus, kaj ke pro stranga koincido de cirkonstancoj tio okazus ankaŭ en la aliaj urboj de la monarkejo, same kiel en la bibliotekoj de privatuloj, kie sin trovas kolektoj da leĝoj, tiel ke en tuta Prusujo neniu leĝo en legitima formo plu ekzistus.

La lando per tiu akcidento estus tiam perdinta ĉiujn siajn leĝojn, kaj al ĝi nenio restus ol fari novajn.

Ĉu vi kredas, gesinjoroj, ke en tiu kazo oni povus agi tute laŭvole, ke oni povus fari tute laŭvolajn novajn leĝojn, simple laŭplaĉe? Ni vidos.

Mi do imagas la kazon, ke vi dirus: la leĝoj pereis, ni tial faros novajn leĝojn kaj ni ne volas doni al reĝeco tian saman situacion, kian ĝisnun ĝi okupadis, aŭ eĉ: ni lasu al ĝi nenian situacion.

Tiam la reĝo simple dirus: malgraŭ tio, ke la leĝoj pereis, tamen, al mi efektive apartenas la armeo, ĝi marŝas je mia ordono, je mia ordono la komandantoj de l' armilejoj kaj kazernoj efektive elvenigas la kanonojn, la artilerio iras kun ili en la stratojn, kaj apogante sur tiu efektiva potenco, mi ne toleros, ke vi donos al mi alian situacion, ol mi volas.

Vi vidas, gesinjoroj: reĝo, al kiu apartenas la armeo kaj la kanonoj — tio estas peco da konstitucio.

Aŭ mi imagas ke vi diras: ni estas 18 milionoj Prusanoj. Inter tiuj 18 milionoj estas nur treege malgranda nombro da nobelaj grandbienuloj. Ni ne komprenas, kial tiu treege malgranda nombro da grandbienuloj devus havi tiom da influo, kiom ĉiuj 18 milionoj kune, formante el si supran reprezentantaron, kiu prijuĝas kaj malakceptas la decidojn de la reprezentantaro elektita de l' tuta nacio, se ili estas bonaj por la nacio. Mi metas la kazon, ke tiel parolante vi dirus: ni *ĉiuj* estas „supruloj", ni ne volas plu specialan supran reprezentantaron.

Nu, gesinjoroj, la grandaj nobelaj bienposedantoj certe ne povus elsendi siajn kamparanojn kontraŭ vi! Tute kontraŭe, ili sendube havus sufiĉe da zorgoj por savi sin por siaj kamparanoj unue.

Sed, la nobelaj terposedantoj ĉiam havis grandan influon ĉe reĝo kaj kortego kaj per tiu influo ili povas tiel same libere disponi je la armeo kaj je la kanonoj, kiel ili tion povus, se tiuj potenciloj rekte apartenus al ili.

Vi do vidas, gesinjoroj: nobelaro, kiu havas influon ĉe

la kortego kaj ĉe la reĝo — tio estas peco da konstitucio!

Aŭ mi imagu le malan kazon, ke reĝo kaj nobelaro interkonsentus reenkonduki la mezepokan gildecon, ne nur por la malgranda metiaro, kiel oni tion efektive provis antaŭ kelke da jaroj, sed reenkonduki ĝin same tia, kia ĝi ekzistis en la mezepoko, nome por la tuta produktado en la socio, do ankaŭ por la granda kaj por la fabrika produktado kaj por la produktado per maŝinaro. Vi sendube scias, gesinjoroj, ke la grandkapitalo ne povus produkti sub la mezepoka gildosistemo. Ĉar, sub tiu sistemo, ekzistis, ekzemple, ĉie laŭleĝaj limigoj inter la diversaj, eĉ plej parencaj laborbranĉoj, kaj al neniu estis permesata unuigi du branĉojn. La kolorigisto ne rajtis gipsumi truon, inter la najloforĝistoj kaj la seruristoj estis senĉese procesoj pri la limoj de la reciproka metia kompetenco; la katunpresisto ne rajtis dungi ŝtofkolorigiston. Tiel same ankaŭ la kvanto, kiun ĉiu rajtis produkti, estis regulata; ĉar en ĉiu loko ĉiu mastro en ĉiu industrio rajtis okupi nur egalan, leĝe fiksitan nombron da laborantoj.

Vi vidas, ke jam pro tiuj du kaŭzoj la grandproduktado, tiu per sistemo da maŝinoj, sub tiu gildeco ne povus funkcii eĉ unu tagon. Ĉar tiu granda produktado bezonas antaŭ ĉio, kiel aero por vivi: kunigon de ĉiaj laborobranĉoj en unu industria entrepreno; ĝi bezonas, due, amasan produktadon kaj liberan konkuradon, do *senliman*, laŭvolan uzadon de laborantoj.

Se oni do nuntempe enkondukus la gildosistemon — kio tiam okazus?

La s-oj Borsig, Egels k. t. p., ĉiuj grandaj katunfabrikantoj, ĉiuj silkfabrikantoj k. t. p., simple fermus siajn fabrikejojn kaj maldungus siajn laboristojn, la direkcioj de fervojoj devus fari la samon, komerco kaj industrio ekhaltus, granda nombro da mastroj estus per tio devigataj maldungi siajn helpantojn, tiu tuta sennombra popol-

amaso ondus tra la stratoj, postulante panon kaj laboron; malantaŭ ĝi starus la granda burĝaro, instigante tiun amason per sia influo, kuraĝigante ĝin per sia reputacio, kaj subtenante ĝin per sia mono; kaj ekflamus batalo, en kiu la venko neniel estus al la armeo.

Vi do vidas, gesinjoroj, la s-oj Borsig kaj Egels, la grandindustriistoj ĝenerale,—ili estas peco da konstitucio.

Aŭ mi supozu la kazon, ke la registaro iel tuŝus senteble interesojn de la grandaj bankistoj. Ekzemple, la registaro decidus, ke la Reĝa Banko ne plu rajtus plifaciligi la krediton de la grandaj bankistoj kaj kapitalistoj, kiuj sen tio jam disponas je ĉiom da mono kaj da kredito, kaj kiuj nuntempe simple per sia subskribo povas diskonti, t. e. obteni krediton; supozu, ke la registaro ordonus, ke la tasko de la Reĝa Banko estus: faciligi la krediton por la *negrandaj kaj mezgrandaj* homoj — kaj ke oni donus al la Reĝa Banko tian organizon, kia havus tiun rezultaton — ĉu *tio* povus esti, gesinjoroj?

Nu, gesinjoroj, ribelon tio sendube ne kaŭzus. Sed, la afero tamen por la nuntempa registaro ne estus farebla.

Ĉar de tempo al tempo, gesinjoroj, la registaro sin trovas en situacio, ke ĝi bezonas tiom da mono, tian amason da monorimedoj, ke ĝi ne kuraĝas ĝin preni en formo de impostoj. Tiukaze ĝi solvas la problemon tiamaniere, ke ĝi formanĝas la monon de l' estonteco, t. e. ke ĝi prunteprenas monon kaj por tio eldonas ŝtatpaperojn. Por tio ĝi bezonas la bankistojn. Certe, iom post iom tiuj paperoj grandparte transiras en la manojn de l' tuta klaso posedanta de l' nacio. Sed tio bezonas tempon, ofte multe da tempo. La registaro, tamen, bezonas la monon *tuj* kaj *ĉiom samtempe*, aŭ en malmultaj partoj; por tio ĝi bezonas interulojn, perulojn, kiuj povas meti je ĝia dispono la tutan monsumon samtempe, kaj kiuj mem sin okupas kun la disvendo de l' rentopaperoj, kiujn ili por tio ricevas, iom post iom al la granda publiko, profitante tiumaniere

super la ordinara gajno tiun pro pli alta kurzo, artifike donata al la paperoj en la burso. Tiuj peruloj estas la grandaj bankieroj kaj tial nuntempa registaro *devas* eviti malpaciĝi kun ili.

Vi do vidas, gesinjoroj, la bankieroj Mendelssohn k. t. p., la borso ĝenerale — tio estas peco da konstitucio.

Aŭ mi supozu la kazon, ke la registaro volus eldoni, ekzemple, punoleĝon, same kiaj ekzistas en Ĥinujo, laŭ kiu oni, se iu ŝtelas, punus la *patron* de la ŝtelinto. Tio ja nek ankaŭ estus ebla, ĉar kontraŭ tio protestus tro vigle la ĝenerala civilizita opinio, la ĝenerala konscio. Ĉiuj ŝtatoficistoj kaj aliaj altranguloj treege konsterniĝus, kaj eĉ la membroj de la Supra Ĉambro protestus kontraŭ tia leĝo; vi do vidas, gesinjoroj, ke la ĝenerala konscio, la ĝenerala opinio estas, interne certaj limoj, peco da konstitucio.

Aŭ mi supozu la kazon, ke la registaro decidus kontentigi la nobelularon, la bankierojn, la grandajn industriistojn kaj la grandajn kapitalistojn ĝenerale, sed deprenus al malgrandburĝoj kaj laboristoj la *politikan* liberecon. Ĉu *tio* estus ebla, gesinjoroj? Ho certe, gesinjoroj, *tio* estas ebla, por iom da tempo; jam sufiĉe ja montris sin, ke *tio* estas ebla, kaj ni havos ankoraŭ la okazon okupi nin pri tio.

Sed nun mi supozos la kazon tia, ke oni volus depreni al la malgrandburĝaro kaj al la laboristoj ne nur ilian *politikan*, sed ankaŭ ilian *personan* liberecon, t. e., ke oni farus ilin laŭpersone malliberaj, servituloj, kiaj en delonge pasintaj centjaroj de mezepoko efektive ekzistis en multaj landoj. Ĉu *tio* estus ebla, gesinjoroj? Ne, eĉ se la reĝo, la nobelularo kaj la tuta burĝaro interkonsentus pri tio, ĝi *tamen* ne estus farebla! Ĉar en tiu kazo vi dirus: ni prefere lasos mortbati nin, ol suferi tion. La laboristoj ekrapidus sur la stratojn, eĉ se Borsig kaj Egels ne fermus siajn fabrikojn, la tuta malgrandburĝaro aliĝus al ili, kaj

tiel ke ilia komuna rezisto estus nur tre malfacile venkebla — vi per tio vidas, gesinjoroj, ke en certaj kazoj *plej ekstremaj* vi ĉiuj estas peco da konstitucio.

Ni do nun vidis, gesinjoroj, kio estas la konstitucio de iu lando, nome: la efektivaj *potencoproporcioj* en la lando ekzistantaj.

Sed kiel estas kun tio, kion oni kutime nomas konstitucio, kun la *jura* konstitucio? Nu, gesinjoroj, vi nun ja komprenas per vi mem, kiel estas kun tio!

Tiujn *efektivajn* potencoproporciojn oni skribas sur folio da papero, oni donas al ili *skriban* esprimon, kaj kiam ili estas *skribitaj*, tiam ili ne plu estas nur *faktaj* potencoproporcioj, — sed ili tiam estas iĝintaj ankaŭ *juro, juraj institucioj*, kaj tiu, kiu agas kontraŭ ili, estas punata.

Tiel same, gesinjoroj, estas por vi nun sendube klare, kiel oni faras tiun skribadon de tiuj efektivaj potencoproporcioj, per kio ili iĝas *juraj* institucioj.

Oni ne skribas en ĝi: s-o Borsig estas peco de la konstitucio, s-o Mendelssohn estas peco de la konstitucio, k. t. p., sed oni esprimas tion multe pli civilizite.

Se oni, ekzemple, deziras fiksi: la malmultaj grandindustriistoj kaj grandkapitalistoj en la monarkejo havas de nun same tiom kaj eĉ pli da potenco kiom ĉiuj burĝoj, laboristoj kaj kamparanoj kune, tiam oni certe ne skribas tion en tiu malkaŝa, senvuala formo. Sed oni eldonas leĝon, tian, ekzemple, kia la triklasa elektoleĝo de Prusujo, el jaro 1849, per kiu oni dividas la nacion en tri klasojn da elektantoj, laŭ la grando de l' impostosumo, kiun ili pagas kaj kiu, kompreneble, estas laŭ proporcio de ilia kapitalposedo.

Laŭ la *oficialaj* listoj, gesinjoroj, faritaj en jaro 1849 de la registaro, post eldono de tiu elektoleĝo, estis tiam en tuta Prusujo 3 255 703 elektantoj, kiuj dividiĝis en tri klasojn jenmaniere:

Al *unua* klaso da elektantoj apartenis en tuta Prusujo:
153 808 elektantoj
al la *dua* klaso 409 945 „
al la *tria* klaso 2 691 950 „

Mi ripetas, gesinjoroj, ke tiuj ciferoj estas prenitaj el la oficialaj listoj.

Ni vidas el tio, ke laŭ tiu aranĝo 153 808 tre riĉaj personoj en Prusujo havas same tiom da politika potenco kiom la 2 691 950 burĝoj, kamparanoj kaj laboristoj kune, plie, ke tiuj 153 808 tre riĉaj personoj kaj la 409 945 mezriĉaj personoj de la dua klaso, havas kune la *duoblon* de la politika potenco, kiun posedas la tuta cetera nacio kune, kaj ke la 153 808 tre riĉaj personoj kaj nur la duono de la 409 945 elektantoj de la dua klaso kune jam posedas pli da politika potenco ol la alia duono de l' mezriĉa dua klaso kaj la 2 691 950 de la tria klaso kune.

Vi vidas el tio, gesinjoroj, ke oni per tio atingas la saman rezultaton, ol se oni krude skribus en la konstitucio: riĉulo havos 17-oble la politikan potencon de alia burĝo, aŭ tiom, kiom 17 aliaj personoj.

Antaŭ ol tiu triklasa elektoleĝo estis eldonata, ekzistis — per la leĝo de 8a de aprilo 1848 — la *universala* elektrajto, kiu donis al ĉiu civitano, ĉu riĉa ĉu malriĉa, la *saman* elektrajton, do la *saman* politikan potencon por partopreni al la fiksado de la volo kaj de l' celo de la ŝtato. Vi do vidas, gesinjoroj, ke mi rajtis diri, ke, bedaŭrinde, estas sufiĉe facile, depreni al vi, malgrandburĝoj kaj laboristoj, vian *politikan liberecon*, se oni nur ne forprenas de vi, almenaŭ ne *rekte*, vian *personan* havajon, ne tuŝas rekte vian korpon kaj apartenaĵon. Ĉar vi en 1849 lasis tute facile depreni al vi la elektrajton, kaj ĝis nun mi nenion aŭdis pri iu agitado por reobteni ĝin.

Se oni plie volas fiksi en la konstitucio: malgranda nombro da nobelaj bienposedantoj havos, sole por si, tiom da potenco kiom riĉuloj, bonfartantoj kaj neposedantoj

do kiom la elektantoj de la tri klasoj, de tuta nacio, kune, tiukaze on ree evitas diri tion per tiaj necivilizitaj vortoj — ĉar bonvolu noti, gesinjoroj, unu fojon por ĉiam: ĉio klara estas *ne*civilizita — sed oni skribas en la konstitucio: el la reprezentantoj de l' antikva kaj fiksita bienularo kun kelkaj negravaj aldonoj estos elektata Supera Ĉambro, kies aprobon bezonos ĉiu decido de l' Ĉambro de Deputitoj reprezentanta la tutan nacion, — per kio do estas donata al manpleno da antikvaj bienposedantoj la politikan potencon: esti kontraŭpesilo eĉ kontraŭ la *unuanima* volo de l' tuta nacio kun ĉiuj ĝiaj klasoj.

Kaj se oni deziras, ke la reĝo havu same tiom kaj ankoraŭ *multe pli* da politika potenco, kiom havas la tri elektoklasoj, do la tuta nacio, kaj la nobela bienposedantaro kune, tiam oni agas jene:

Oni skribas en artikolo 47 de la konstitucio: „la reĝo disponas je ĉiuj oficoj en la armeo" kaj en artikolo 108 oni diras: „Ĵuro de la armeo je la konstitucio ne havos lokon." Kaj por apogo de tiu artikolo oni konstruas teorion, kiu efektive trovas en tiu artikolo principan bazon, nome la teorion, ke la reĝo havas rilate al la armeo *tute alian* pozicion ol rilate al aliaj institucioj de l' ŝtato; ke li rilate al la armeo estas ne nur *reĝo*, sed super tio ankoraŭ io tute alia, tute speciala, misteroplena, nekonata, por kio oni elpensas la nomon „*militestro*"; ke pro tio la parlamento aŭ la nacio ne estas kompetenta priokupi sin pri la armeo, nek ankaŭ sin intermiksi en ties aferoj kaj organizo, sed havas rilate al la armeo neniun taskon ol voĉdoni la monon, kiun ĝi bezonas. Nu, oni devas konsenti, kiel jam dirite, gesinjoroj — vero antaŭ ĉio — ke tiu teorio havas kelkan bazon en la artikolo 108 de la konstitucio. Ĉar, se la konstitucio fiksas, ke la armeo ne *ĵuros* je konstitucio, kiel ja ĉiuj ŝtatoficistoj kaj la reĝo mem, tiam *oni proklamas per tio en principo*, ke la armeo *staras ekster la konstitucio*, ke ĝi havas nur rilaton al la

*persono de l' reĝo*, kaj ne al la *lando*. Se ja la reĝo disponas je ĉiuj oficoj en la armeo kaj se la armeo havas al li apartan rilaton, se tio estas fakto, tiukaze la reĝo havas ne nur same tiom, sed dekoble pli da politika potenco, kiom havas la tuta lando kune, eĉ en la kazo, ke la lando estus efektive dek-, dudek-, kvindekoble pli forta ol la armeo. La kaŭzo de tiu ŝajna absurdaĵo estas tre simpla.

La politika potencilo de l' reĝo, la armeo, estas *organizita*, ĉiam kune, bonege disciplinita, kaj ĉiumomente preta ekmarŝi; sed la fortoj, kiuj estas en la nacio, gesinjoroj, kvankam ili estas nekalkuleble pli grandaj, *ne* estas organizitaj; la volo de l' nacio, kaj speciale la grado de decideco, kiun tiu volo jam atingis, ne estas por la membroj de la nacio facile ekkoneblaj; neniu do scias precize, kiom da kunuloj li eventuale havus. Ankaŭ mankas al la nacio tiuj instrumentoj de potenco organizita, tiuj gravegaj apogiloj de konstitucio, pri kiuj ni jam parolis: la *kanonoj*. Certe, la kanonoj estas pagataj per la mono de l' *civitanoj*; certe, ili estas farataj kaj senĉese plibonigataj laŭ la progreso de l' sciencoj, kiuj evoluiĝas en la burĝa societo: fiziko, teĥniko k. t. p. Tial ilia ekzistado mem estas jam pruvo, ĝis kiu grado jam evoluadis la burĝa socio, la sciencoj, la artoj teĥnikaj kaj diversaj industrioj kaj metioj. Sed ĉi tie konvenas la versaĵo de Virgilio: *Sic vos non vobis!* vi produktas, sed ne por vi! Ĉar la kanonoj ĉiam estas farataj nur por la potenco *organizita*, tial la nacio scias, ke en iu konflikto ĝi trovus tiujn infanojn kaj pruvojn de sia potenco nur kontraŭ si. Jen la kaŭzoj, kiuj ebligas, ke la malpli granda, sed organizita potenco ofte dum longa tempo povas superi la multe pli grandan, sed neorganizitan potencon de l' nacio, se tiu ĉi, pro konstanta regado kaj estrado je maniero, kiu estas kontraŭ la volo de la nacio kaj kontraŭ ĝia intereso, fine decidas meti kontraŭ la potenco

organizita sian neorganizitan superpotencon kaj kontraŭstari ĝin.

Ni ĝisnun do vidis, gesinjoroj, kiel estas kun la du konstitucioj de iu lando, la *efektiva* konstitucio, nome la efektivaj potencoproporcioj, kiuj en iu lando ekzistas, kaj la skribita konstitucio, kiun ni povas nomi, por ĝin diferencigi de la alia: la *folio da papero.*

Nu, kiel vi mem tuj vidos, ĉiu lando ĉiam havis *veran* konstitucion, kaj nenio estas pli malĝusta, nenio tiom kondukas al eraraj konkludoj, kiel la ege disvastiĝinta, superreganta opinio, ke estas specialaĵo de l' tempo moderna, havi konstituciojn aŭ leĝojn fundamentajn. Kontraŭe, same kiel ĉiu korpo havas iun ajn konstitucion, bonan aŭ malbonan, tian aŭ alian, tiel ankaŭ ĉiu lando havas realan konstitucion. Ĉar en ĉiu lando ekzistas ja *kiaj ajn* efektivaj potencoproporcioj.

Kiam, nelonge antaŭ la franca revolucio de XVIIIa jarcento, sub la absoluta monarkio en Francujo, Ludoviko XVI per dekreto de 3a de februaro 1776 nuligis la servuton pri konstruado de vojoj, laŭ kiu la kamparanoj estis devigataj plenumadi senpage la konstruadon de vojoj, kiu servuto per la sama dekreto estis anstataŭata de speciala imposto por la konstruado de l' vojoj, imposto ankaŭ trafonta la bienojn de l' *nobeluloj,* tiam la franca parlamento, kontraŭstarante tion, ekkriis: „Le peuple de France est taillable et corvéable à volonté, c'est une partie de la constitution que le roi ne peut changer," Esperante: la popolo de Francujo, nome la *ne*privilegiita, la malaltranga popolo, povas esti laŭ bontrovo ŝarĝata per servutoj kaj impostoj; tio estas ero de la konstitucio, kiun la reĝo ne povas aliigi.

Vi vidas, gesinjoroj, oni parolis tiam pri konstitucio, eĉ pri tia, kian reĝo ne rajtis ŝanĝi, same kiel nuntempe. Kio estas prezentita kiel konstitucio, nome ke la malalta popolo povis esti ŝarĝata laŭ bontrovo per impostoj kaj

servutoj, tio, certe, ne estis skribita en speciala dokumento, enhavanta ĉiujn rajtojn de la lando kaj ĉiujn gravajn principojn de regado; oni simple tiel esprimis la *efektivajn potencoproporciojn* ekzistantajn en mezepoka Francujo. La malalta popolo efektive estis estinta en la mezepoko tiom senpotenca, ke oni laŭvole povis ĝin ŝarĝi per impostoj kaj servutoj; laŭ tiu efektiva situacio oni ĉiam estis aginta, la popolo ĉiam estis tiel ŝarĝita. Tiu efektiva procedo kreis la tielnomitajn *precedenckazojn*, kiuj ankoraŭ nun en Anglujo kaj dum la mezepoko ĉie, ludis tiom gravan rolon ĉe konstitucidemandoj. Dum la efektiva ŝarĝado de l' popolo, oni, kompreneble, ofte elparolis la fakton, ke la popolo tiel povas esti ŝarĝata. Tiu ofta elparolo kreis la *ŝtatrajtan principon*, sur kiu, poste, en similaj okazoj oni sin bazis. Ofte iu speciala situacio havanta radikojn en la efektivaj potencoproporcioj, estis speciale esprimata skribe, sur pergameno. Tiel naskiĝis la tielnomitaj „franchises", liberoj, rajtoj, privilegioj, statutoj de iu klaso, de iu metio, de iu loko.

Ĉiuj ĉi faktoj, precedenckazoj, ŝtatrajtaj principoj, pergamenoj, franchises, statutoj, privilegioj kune, formis la *konstitucion* de la lando kaj ĉiuj kune formis nenion alian ol la nudan esprimon de l' realaj potencoproporcioj en la lando ekzistantaj.

Ĉiu lando do havis ĉiutempe *efektivan* konstitucion aŭ leĝon fundamentan. Kio estas specialaĵo de l' tempo moderna, tio estas — tre grava estas tion ĉiam reteni eble plej klare en memoro — ne la *efektivaj* konstitucioj, sed la *skribitaj* konstitucioj, aŭ la *folio da papero*.

En la tempo moderna ni vidas en la plej multaj landoj celadon, havigi al si *skribitan* konstitucion, kiu fiksas en *unu dokumento*, sur unu folio da papero, ĉiujn instituciojn kaj ĉiujn principojn de regado de la lando.

Kial tiu karakteriza celado de l' moderna tempo?

Jen denove demando tre grava: nur el la respondo al

ĝi povas sin montri, kiel oni ĉe la laboro de konstitucifarado procedas, kion oni havas por pensi rilate al jam faritaj konstitucioj kaj kiel oni devas sin tenadi rilate al ĝi; unuvorte, nur el tiu respondo sin povas montri la tutan *praktikon kaj teorion de ĉia konstitucifarado.*

Mi do demandas: kial la karakteriza celado de l' tempo moderna, fari skribitajn konstituciojn?

Nu, gesinjoroj, kial tio *povus* esti?

Evidente nur *tial*, ke en la *efektivaj potencoproporcioj* kiuj ekzistas en la lando, okazis ŝ a n ĝ o. Se ne okazus tia ŝanĝo en la efektivaj potencoproporcioj de ekzistanta socio, se tiuj proporcioj restus la samaj, tiukaze estus tute ne imageble nek ankaŭ eble, ke tiu socio havus bezonon je *nova konstitucio.* Ĝi restus je la malnova; pleje ĝi kolektus la disajn partojn de ĝi en unu sola dokumento.

Kiel okazas tia ŝanĝo en la efektivaj potencoproporcioj de iu socio?

Imagu, por ekzemplo, mezepokan ŝtaton maldense loĝatan, kiaj estis tiam preskaŭ ĉiuj ŝtatoj, regatan de princo, kaj havantan nobelularon, al kiu apartenas la plej granda parto de tero kaj kamparo. Pro la maldenseco de la loĝantaro, nur tre malgranda parto el ĝi povas esti uzata por industrio kaj komerco, la treege pli granda parto estas ankoraŭ bezonata por kulturi la teron, por produkti la necesajn terkulturaĵojn. Ĉar la tero kaj kamparo grandparte sin trovas en la manoj de l' nobelularo, tial la loĝantaro trovas en ĉiaspecaj gradoj kaj rilatoj okupadon kaj laboron en servo de tiu nobelularo: ĉiuj ĉi rilatoj akordiĝas en tio, ke ili dependigas la tutan loĝantaron de la nobelularo kaj devigas ilin formi ĝian vasalaron por kunbatali en ĝiaj malpacoj. Per la troa kvanto, kiun la nobeluloj ricevas el siaj bienoj, ili tenas en siaj kasteloj armilitojn ĉiuspecajn.

La princo siaflanke havas kontraŭ tiu potenco de la

nobelularo neniun alian potencon ol la helpon de tiuj ĉi nobeluloj, kiuj havas la bonvolon — peni devigi ilin ne estas por li konsilinde — obei al lia alvok' al milito, krom tion li havas nur la ne ankoraŭ notindan helpon de l' malmultaj kaj treege maldense loĝataj urboj.

Kia, gesinjoroj, estus la konstitucio de tia ŝtato?

Nu, tio ja sekvas kun neceseco el la realaj potenco-proporcioj do tiu lando, kiujn ĵus ni observis.

Kompreneble, la konstitucio estas laŭklasa, la nobelularo estas la unua kaj en ĉiu rilato la reganta klaso. Sen ĝia aprobo la princo ne povas imposti je unu spesdeko, li eĉ havas al la nobeluloj nenian alian rilaton ol tiun de „primus inter pares", de „unua inter egaluloj."

Nu, gesinjoroj, precize tiel estis en mezepoko la konstitucio de Prusujo kaj tiu de l' plejmultaj aliaj ŝtatoj.

Nun metu la kazon: la loĝantaro pli kaj pli pliiĝas, industrio kaj metioj ekprosperas kaj liveras per tio la ekzistadorimedojn por nova kreskado de la loĝantaro, kiu komencas plenigi la *urbojn*. Kapitalo kaj monoposedo komencas kolektiĝi en la mano de l' burĝaro, la urbaj gildoj ekdisvolviĝas. Kio okazos nun?

Nu, la kreskado de urba loĝantaro, kiu ne dependas de la nobelularo, kies interesoj, pliĝuste, kontrastas la ĝiajn, estas en la komenco profita por la p r i n c o; ĝi pliigas la militkapablan viraron, kaj tiu estas unue je lia dispono; per la monhelpo de l' burĝoj kaj de l' metiistaro, kiuj multe suferadas pro la senfinaj malpacoj de la nobelularo kaj kiuj por la interesoj de komerco kaj produktado kompreneble deziras burĝan trankvilecon kaj certecon kaj ordigitan justecon, kaj do volonte subtenas la princon per mono kaj per militistoj, la princo povas, tiom ofte kiom li tion bezonas, varbi respektindan armeon multe pli fortan ol la kontraŭstarantaj nobeluloj. Tiu princo do pli kaj pli limigos la potencon de l' nobelularo, li deprenos al ĝi la rajton de intersia milito; se ĝi ofendas la leĝojn

de la lando, la princo detruos ĝiajn kastelojn; kaj post kiam dank' al la industrio sin sufiĉe elvolvis la riĉeco je mono kaj je loĝantaro por ebligi al la princo formi *konstantan armeon*, tiam tiu princo sendas la regimentojn al la parlamentejo, same kiel faris la granda elektoprinco, aŭ li nuligas, kun la krio: „Je stabilirai" la suverenecon kiel „rocher de bronze", la imposti-rajton de l' nobelularo kaj ĝian konsentorajton pri impostoj.

Vi vidas, gesinjoroj, kiel kun aliiĝo de l' *realaj potencoproporcioj* okazis aliiĝo de l' *konstitucio*; nun estiĝis la *absoluta* princeco aŭ reĝeco.

La princo, tamen, ne bezonas *skribi* la novan konstitucion; por tio la princeco estas tro praktika afero. La princo havas en mano la realan, efektivan potencorimedon, la armeo konstanta, kaj tiu armeo estas la *efektiva konstitucio* de tia socio; la princo kaj lia anaro kun la tempo mem esprimas tion, nomante la landon *militista* ŝtato.

La nobelularo, kiu tute ne povas plu konkuri kun la princo, jam delonge devis cedi la posedon de iu propra militista akompanantaro. Ĝi forgesis sian antaŭan antiteson al la princo, kaj ke ili estis lia egalulo; ĝi grandparte transloĝis de siaj kasteloj al la urbo kie restadas la reĝo, ĝuante tie pensionojn kaj pliigante la gloron kaj la aŭtoritaton de l' princo.

Sed, industrio kaj metioj evoluadas ĉiam pli; kun tiu prospero ĉiam pliiĝas la loĝantaro.

Ŝajnas, ke tiu progreso devas esti ĉiam nur je la profito de la princo, ĉar pro tio li povas senĉese pligrandigi sian konstantan armeon, kaj per tio akiras *tutmondan influon*.

Sed, fine, enpaŝas tiom grandega, tiom giganta disvolvo de l' burĝa socio, ke nun la princo ne povas plu, eĉ ne per la armeo konstanta, *partopreni en la sama proporcio*, al tiu progreso en potenco de l' burĝaro.

Kelkaj nemultaj ciferoj tion palpeble montros al vi.

En jaro 1657 Berlin havis 20 000 loĝantojn. Proksimume je sama tempo, je la morto de l' granda elektoprinco, la armeo kalkuliĝis inter 24 000 ĝis 30 000 viroj.

En jaro 1803 Berlin jam havis 153 070 loĝantojn.

En jaro 1819, dekses jarojn poste, Berlin havis jam 192646 loĝantojn.

En tiu ĉi jaro 1819 la konstanta armeo kalkuliĝis — ne enkomprenante la rezervarmeon, kiu ne apartenis al la armeo konstanta, laŭ leĝo de 1814, kiun oni, momente, volas deŝiri al ni — en jaro 1819 la konstanta armeo 137 639 viroj.

Kiel vi vidas, la armeo konstanta fariĝis nun pli ol kvaroble pli granda ol je tempo de l' granda elektoprinco.

Sed, la loĝantaro de Berlin fariĝis pli ol naŭoble pli granda ol estis ĝi tiam.

Sed, ankoraŭ tute alia disvolvo *komenciĝas nun.*

En jaro 1846 — la ciferoj estas prenitaj el oficialaj listoj — la loĝantaro de Berlin konsistis el 389 308 homoj, do preskaŭ 400 000, do duoble pli ol en jaro 1819. En 27 jaroj la nombro de loĝantaro de la urbo — hodiaŭ ĝi atingis jam la ciferon de proksimume 550 000 loĝantoj — *pli ol duobliĝis.*

La konstanta armeo, kontraŭe, enkomprenis en 1846 138 810 viroj, kontraŭ 137 639 en 1819. Ĝi do restis sur la sama nombro, ĝi tute ne povis sekvi tiun gigantan disvolvon de l' burĝeco.

Samtempe kun sia tiel giganta disvolvo, la burĝaro komencas sin *senti* memstara potenco politika. Man-en-mane kun tiu disvolvo de l' loĝantaro iras ankoraŭ pli grandioza disvolvo de l' socia riĉeco, akompanata de tiel same grandioza disvolvo de l' sciencoj kaj de l' ĝenerala klerigado de l' ĝenerala konscio, tiu alia peco da konstitucio, pri kiu ni jam estas parolintaj ĉi-supre. La civitanoj nun diras al si: ni ne volas plu esti senvole regata amaso; ni volas mem regi kaj la princo nur regu nin kaj

regulu niajn aferojn laŭ nia bontrovo. Unuvorte, la realaj potencoproporcioj, kiuj en tiu lando ekzistas, denove *aliiĝis*. Aŭ, alivorte: en tia socio okazas — 18 de marto 1848!

Vi vidas, gesinjoroj, ke tiam okazis en esenco la sama, kion ni, en la komenco de nia esploro, supozis esti ekzemplo neebla. Ni imagis la kazon, ke la socio perdus sian leĝaron per brulado. Nu, se ili ne pereis per fajro, ilin forblovis uragano.

„La Popolo leviĝis,
Ektondris l'uragano."

Se en iu socio okazas triumfanta revolucio, tiam, certe, ankoraŭ daŭradas la privata rajto, sed la tuta leĝaro de la *rajto publika* estas nuligita, aŭ ĝi havas nur provizoran signifon kaj devas esti anstataŭata de nova.

Nun do prezentis sin la bezono, fari *novan, skribitan konstitucion* kaj la reĝo mem kunvokis nun Nacian Reprezentantaron al Berlin, por *fiksi* la novan konstitucion kiel oni tion esprimis unue, aŭ, kiel oni diris poste, por *interkonsenti* kun li pri ĝi.

Nu, en kiu kazo *skribita* konstitucio estas *bona* kaj *daŭra*?

Nu, evidente, kiel ja sekvas per si mem el nia tuta elmontro, nur en tiu sola kazo, se ĝi estas *konforma* al la *efektiva konstitucio,* al la realaj, en la lando *ekzistantaj potencoproporcioj*. Kie la *skribita* konstitucio ne konformas al la *efektiva,* tie devas *neeviteble* okazi konflikto, en kiu je la daŭro la skribita konstitucio, la nura folio da papero, devas esti *venkita* de la efektive en la lando ekzistantaj potencoproporcioj.

Kio do devus esti okazinta tiam, en 1848?

Nu, antaŭ ĉio oni ne devus esti farinta *skribitan*, sed *efektivan* konstitucion, t. e. do, oni devus ŝanĝi unue la realajn potencoproporciojn en la lando ekzistantajn, ŝanĝi ilin *en favoro de l' burĝoj.*

Certe, ĵus je 18a de marto sin montris, ke la potenco

de l' nacio ĉiukaze jam estis pli granda ol la potenco de l' armeo konstanta. Post longdaŭra, sanga batalo la armeo devis reiri.

Sed, mi jam ĉi-supre atentigis pri la grava cirkonstanco, ke ekzistas diferenco inter la potenco de nacio kaj la potenco de l' konstanta armeo, kiu kaŭzas, ke la malpli granda potenco de l' armeo je la daŭro estas tamen pli efika ol la efektive pli granda potenco de l' nacio.

Tiu diferenco konsistas, kiel vi memoras, en tio, ke la potenco de l' nacio estas *neorganizita*, kaj la potenco de l' armeo estas *organizita*, ĉiutage preta rekomenci la batalon; pro tio ĝi estas, je la daŭro, pli efika kaj *devas resti venkinto* de la, kvankam pli granda, sed neorganizita potenco de l' nacio, kiu nur en maloftaj momentoj de granda ekscito amasiĝas.

Tial, se la triumfo gajnita je 18a de marto ne kun *neceseco* fariĝus senfrukta por la popolo, la momento de venko devus esti ekspluatita, por tiom transformi la potencon organizitan de l' armeo, ke ĝi *ne denove* povus esti uzata kiel potencilo de l' reĝo *kontraŭ la nacio*.

Ekzemple, la servotempo de l' soldatoj devus esti limigita je 6 monatoj, daŭro, kiu unuflanke laŭ la opinio de l' plej grandaj militaristaj aŭtoritatuloj tute sufiĉas por plej perfekte ekzerci la militistojn, sed kiu aliflanke estas tro mallonga por penetri la soldatojn per speciala kastospiriton, kaj kiu kaŭzus tian konstantan renoviĝon de l' armeo el popolo, ke *per tio* el la *princa armeo* baldaŭ fariĝus *popolarmeo*.

Oni, plie, devus esti fiksinta, ke ĉiuj subalternaj oficiroj, ĝis almenaŭ la rango de majoro, ne estus enoficigataj de supre, sed estus elektataj de l' armeo mem, por ke la oficoj de oficiro ne estus okupataj en al popolo malamika direkto kaj ne estus uzataj por fari el la armeo blindan instrumenton de l' potenco de l' princo.

Oni devus, super tio, meti la armeon por ĉiu ne spe-

ciale militista krimo, sub la ordinara, burĝa juĝejo, por ke ĝi lernu konsideri sin kiel parto de l' popolo, kaj ne kiel io aparta, kiel kasto speciala.

Kaj la tutan pafilaron, ĉiujn kanonojn — kiuj ja devas nur servi por la defendo de la lando! — oni devus meti — por tiom ili ne nepre necesas por militista ekzercado — en publikaj gardejoj sub kontrolo de l' urbaj magistraroj elektitaj de l' popolo. Kun parto de tiu artilerio oni devus formi artileribrigadojn de *gvardio popola*, por ke la kanonoj, tiu gravega peco da konstitucio, estu ankaŭ je la dispono de l' popolo.

El ĉio ĉi, gesinjoroj, *nenio* estas farita en printempo kaj somero de 1848; kaj ĉu vi povus miri pri tio, ke la revolucio de marto estis haltigata en novembro kaj do restis sen rezultato? Certe ne, ĝi estis nur sekvo necesa de tio, ke en la realaj potencoproporcioj oni nenion estis ŝanĝinta.

La princoj, gesinjoroj, estas multe pli bone servataj ol vi! La servistoj de princo ne estas belparolemuloj, kiaj tre ofte estas la servantoj de l' popolo. Sed ili estas *praktikaj* homoj, ili posedas la instinkton, kiu necesas. S-ro Manteuffel, certe, ne estis granda elokventulo. Sed li estis viro praktika! Post kiam en novembro 1848 li estis dispelinta la Nacian Kunvenon kaj estis veturiginta la kanonojn en la stratojn — kion li, poste, faris unue? Ĉu li, eble, verkis reakcian konstitucion? Ho de dio, tute ne — tio ne urĝis, tion li prokrastis al tempo konvena! Li eĉ donis al vi en decembro 1848 sufiĉe liberalan konstitucion skribitan. Sed per kio li komencis agadi en novembro? kio estis lia unua ago? Nu, gesinjoroj, vi ja tion ankoraŭ memoras: li komencis jene, ke li *senarmigis* la civitanojn, deprenis al ili la *armilojn*. Vidu, gesinjoroj, *senarmigi la venkitojn*, tio estas la ĉefafero por la venkinto, se li ne volas, ke ĉiumomente la batalo povu rekomenciĝi.

En la komenco de nia esploro, gesinjoroj, ni procedis tre malrapide, por unue konscii pri la ideo de konstitucio. Eble, por multaj ni eĉ iris tro malrapide. Sed, jam de longe vi, sendube, rimarkis, ke depost ni trovis tiun ideon, disruliĝis antaŭ ni, unu post alia, la plej surprizaj konsekvencoj; ke ni nun vidas pli klare la aferojn, kaj tute alie ol la aliaj ilin konas; ke, ĝustedire, ni venis al konsekvencoj, kiuj plejparte kontrastas ĉion, kion la publika opinio pri tio kutimas supozi.

Ni rapide observu ankoraŭ kelkajn el tiuj konsekvencoj.

Mi ĵus montris, ke en 1848 oni faris nenion el tio, kio estas necesa por aliigi la efektivajn en la lando ekzistantajn potencoproporciojn: nenion por transformi la armeon de armeo de princo en armeo de popolo.

Unu propono, tion celanta kaj metanta unuan paŝon sur tiu vojo, estis tamen farata, nome la propono de Stein, celante provoki ministran armeordonon, ke ĉiuj reakciemaj oficiroj demetu sian oficon.

Sed, vi memoras, gesinjoroj, ke kiam la Nacia Kunveno apenaŭ estis akceptinta tiun proponon, tiam la tuta burĝaro kaj la duono de la lando kriis: la Nacia Kunveno faru la *konstitucion*, ĝi ne ĉikanu la ministraron, ĝi ne perdu tempon kun *interpelacioj*, nek kun aferoj, kiuj koncernas la „ekzekutivon"; faru konstitucion, faru konstitucion! oni kriis, kvazaŭ okazis brulo.

Vi vidas, gesinjoroj, tiu tuta burĝaro, tiu duono de la lando kiuj tiel kriis, *komprenis absolute nenion* pri la esenco de konstitucio.

Fari *skribitan* konstitucion, tio estis la plej malgrava bagatelo, tio ja estas farebla, se necese, en trioble 24 horoj, tio estis la *lasta*, kio necesis; kun tio, se farita *antaŭtempe*, nenio estis farita.

*Transformi la realajn, efektivajn* potencoproporciojn *en la lando, sin okupi kun la potencohavantoj, tiel* influigi je ili, ke ili ne plu propravole povas sin meti kontraŭ

la volo de l' nacio — *tio* estis tiam la plej grava afero, tio unue devis esti plenumita, por ke skribita konstitucio povu esti daŭra.

Tio ne ĝustatempe okazinte, oni eĉ ne lasis la tempon al la Nacia Kunveno, fari konstitucion, oni dispelis ĝin per la nerompitaj potenciloj de la Ekzekutivo.

Dua konsekvenco. Imagu la kazon, ke oni ĝiatempe n e estus forpelinta la Nacian Kunvenon kaj ke tiu ĉi *efektive* sukcesus prilabori kaj fiksi konstitucion.

Ĉu *tio* estus ŝanĝinta ion efektivan en la plenumiĝo de l' aferoj?

Tute ne, gesinjoroj; la pruvo por tio kuŝas en la faktoj mem. La Nacia Kunveno, certe, estis forpelita, sed la reĝo mem proklamis je 5a de decembro konstitucion, kiu estis kolektita el la postlasitaj paperoj de l' Nacia Kunveno kaj en la plej multaj punktoj efektive konformis al tiu, kiun ni povus atendi de la Nacia Kunveno.

Nun do tiu konstitucio estis proklamata de la reĝo mem, ne *trudata* al li, sed de li — la venkinto — libervole donata. Nu do, ŝajnas, tiu konstitucio estus des pli vivipova.

Tute ne, gesinjoroj! Tute neeble! Se vi havas en via ĝardeno pomarbon, kaj vi pendigas sur ĝi etiketon, sur kiu vi skribas: tio estas figarbo, ĉu per tio la arbo fariĝis figarbo? *Ne,* kaj se vi kunvokus ĉiujn, kiuj estas en via domo, eĉ se vi kolektigus ĉirkaŭ vi ĉiujn loĝantojn de la lando kaj laŭte kaj solene igus ilin ĵuri: tio estas figarbo — la arbo restas, kio ĝi estis, kaj laproksiman jaron tio montriĝos, tiam ĝi portos *pomojn,* ne *figojn.*

Kiel ni vidis, estas la sama afero kun la *konstitucio.* Kio estas skribata sur la *folio da papero,* tio estas tute egala, se ĝi ne estas konforma al la efektivaj potencoproporcioj.

Sur la folio da papero de l' 5a de decembro 1848, la reĝo konsentis de si mem grandan nombron da koncesioj,

kiuj tamen ĉiuj kontrastis la *efektivan* konstitucion, nome la realajn, faktajn potencilojn, kiujn la reĝo ja posedis ankoraŭ kiel antaŭe. Kun la sama neceseco, kiu estas en la leĝoj de Naturo, la *efektiva* konstitucio realigis sin paŝo post paŝo super la *skribita* konstitucio.

Tiel devis okazi, ke la reĝo — kvankam la konstitucio de la 5a de decembro 1848 estis akceptita de la Revizo-kunveno — tuj entreprenis serion da ŝanĝoj, komencante per la triklasa elektoleĝo de 1849. Kun la helpo de la Ĉambro, kreita per tiu elektoleĝo, estis farataj plej *fundamentaj* ŝanĝoj en la nova leĝo fundamenta, kiu tial ne antaŭ la jaro 1850 povis esti ĵurata de la reĝo. Kaj depost ĝi, fine, estis ĵurita, tiam la ŝanĝado komenciĝis *ankoraŭ pli ege!* Ĉiu jaro depost 1850 estas markita de tiaj ŝanĝoj. Neniu standardo, eĉ se ĝi ĉeestis en 100 bataloj, povas esti tiel disŝirita kaj tiel traborita kiel nia konstitucio!

Tria konsekvenco. Vi scias, gesinjoroj, ke en nia urbo ekzistas partio, kies organo estas „Volkszeitung" (Popol-gazeto) — partio, mi diras, kiu grupiĝas kun febra timego ĉirkaŭ tiu ĉifoniĝinta standardo, ĉirkaŭ nia kribrilsimila konstitucio; partio, kiu pro tio sin nomas „konstituci-fidela partio", kaj kies krio de batalo estas: „Ni restu fidela al la konstitucio, pro dio, la konstitucio, la konstitucio, brulas, brulas!"

Gesinjoroj, *tiom ofte* vi vidas, indiferente kie kaj kiam, ke iu ajn partio, alprenas por batalkrio la timvokon: „grupiĝi ĉirkaŭ la konstitucio" — *kion* vi povas el tio konkludi? Mi demandas vin, gesinjoroj, ne kiel al *volantaj* homoj; mi ne direktas mian demandon al via *volo.* Mi demandas vin nur kiel *pensantajn* homojn: kion vi devus konkludi el tiu simptomo?

Nu, gesinjoroj, vi povos, ne bezonante esti profetoj, en tia kazo ĉiam diri al vi kun granda certeco: *tiu* konstitucio estas en agonio; ĝi jam estas preskaŭ malviva,

ankoraŭ kelke da jaroj kaj ĝi tute ne plu ekzistas.

La kaŭzoj estas simplaj. Se skribita konstitucio konformas la efektivajn potencoproporciojn, tiam tiu krio *ne* estos aŭdata. De *tia* konstitucio ĉiu restas zorgplene malproksima kaj sin gardas proksimiĝi al ĝi. Kontraŭ tia konstitucio neniu revas momenton ion entrepreni; ĉar en la mala kazo lin ne atendus tre favora sorto. Se la skribita konstitucio estas konforma al la efektivaj potencoproporcioj, tie neniam povas okazi, ke iu partio faras specialan batalkrion el la devizo: tenadi al la konstitucio. Kiam tiu krio estas elpuŝata, tiam estas tio certa kaj netrompa signo, ke ĝi estas *krio pro timo;* alivorte: tiam estas en la konstitucio ĉiam ankoraŭ io, kio kontrastas kun la *efektiva* konstitucio, kun la efektivaj potencoproporcioj. Kaj kie la kontrasto ekzistas, tie la *skribita* konstitucio estas pereonta — nek dio nek kriado povus ĝin savi.

Ĝi povas esti aliigata dumaniere, dekstren aŭ maldekstren, sed *resti* ĝi ne povas. La *voko, gardi ĝin,* jam pruvas tion al la homo klare pensanta. Ĝi estas aliigebla *dekstren,* se la registaro entreprenas la ŝanĝon, por konformigi la skribitan konstitucion al la efektivaj potencoproporcioj de la *organizita* potenco de la socio. Aŭ sin levas la *neorganizita* potenco de la socio, pruvante denove ke ĝi estas pli granda ol la potenco organizita. En tiu kazo la konstitucio estos ŝanĝata kaj levata same tiom *maldekstren,* kiom en la alia kazo *dekstren.* Sed *pereonta* ĝi estas en ĉiu kazo.

Gesinjoroj, se vi ne nur konservos en via memoro kaj zorgplene pripensos la referaton, kiun mi havis la honoron prezenti al vi, sed pluen pripensante deduktos el ĝi ĉiujn ĝiajn konsekvencojn, tiam vi havigas al vi la tutan praktikon kaj la tutan teorion de konstitucifarado. Konstituciodemandoj ne estas, laŭorigine, demandoj de *juro,* sed demandoj de *potenco*; la *efektiva* konstitucio

konsistas eksklusive en la realaj, efektivaj potencoproporcioj, kiuj en iu lando ekzistas; skribitaj konstitucioj havas nur tiam valoron kaj daŭron, kiam ili estas la vera esprimo de l' efektivaj potencoproporcioj en la lando ekzistantaj — *jen* estas la esenco de konstitucio, jen estas la principoj, kiujn vi devas teni. Hodiaŭ mi elvolvis tiujn principojn speciale en rilato kun la *potenco de l' armeo* — unue ĉar la malmulto da tempo ne permesis trakti pli, due, ĉar la armeo estas la plej decidiga kaj plej grava el ĉiuj potencorimedoj. Sed vi mem komprenas, ke estas la sama afero koncerne la organizon de l' juĝoficistoj, de l' administradoficistoj k. t. p.; tiuj estas same ankaŭ organizitaj potenciloj de iu socio. Se vi konservas tiun. ĉi referaton en via memoro, tiam, gesinjoroj, se sin prezentos denove la okazo doni al vi konstitucion, vi scios kiel necesas agi en tio, ke plenigado de folio da papero valoras neniom, sed ke nur io signifa estas farita, se oni estas ŝanĝinta la efektivajn potencoproporciojn.

Ĝis tiam kaj, intertempe, por tuja uzado, vi sendube komprenis per mia parolado, kvankam mi pri, tio ne diris unu vorton, gesinjoroj, el kia bezono naskiĝis la nova projekto pri pliigo de l' armeo, ĵus prezentita al vi. Vi per vi mem ja nun komprenas, el kiu fonto fluas tiu projekto.

La reĝeco, gesinjoroj, havas praktikajn servistojn, ne belparolantojn, sed praktikajn servistojn, kiaj estus al vi dezirindaj.